

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Elokuu ♦ Aŭgusto

4/1998



*Ensimmäinen suomalainen multimediateos Esperantosta.
Matti Lahtisen haastattelu s. 5.*

Rememoraĵoj pri la someraj kursoj, p. 8-10

Kampanjo 2000 konkretiĝas, p. 3-4

Multaj manieroj bani, p. 6

EAF:n jäsenjärjestöt, s. 19

Tiu ĉi numero aperos ankaŭ en Interreto: <http://www.sci.fi/~matlah/eaf/e-lehti>

Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ aimo.rantanen@jylk.jyu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@icl.fi

WWW-sivujen taitto/ Enpaĝigo de TTT-paĝoj: *Matti Lahtinen*

Syrjälänkatu 6 B 61, 40700 Jyväskylä. ☎ (014) 615 054 ✉ matlah@sci.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmogatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 500

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; työ/laboro: (03) 249 4313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Jukka Pietiläinen*

Nyyrikintie 4 H 47, 33540 Tampere. ☎ (03) 261 7871 ✉ tijupie@uta.fi

Sekretario/Sihtööri: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Ali-Simola, Friskinkatu 2 A 33, 20360 Turku. ☎ (02) 238 7767

Kimmo Hakala, 72300 Vesanto. ☎ (017) 648 831 ✉ khakalat@nettilinja.fi

Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609

Tuula Virolainen, Auringonkatu 8 E 48, 02210 Espoo. ☎ (09) 803 6149 ✉ tuula.virolainen@vtt.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Jussi Jäntti, Retkeilijäntie 5 B 14, 70200 Kuopio. ☎ (049) 859 641

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Oficejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎✉ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Kampanjo 2000 konkrete

Ne estis io nova legi pri la Kampanjo 2000 antaŭ iuj jaroj. Tiaj paperoj estis ankaŭ en pasinteco. Kaj per neprofunda okulumado la dokumentoj pri tiu kampanjo ŝajnis esti renovigita versio de malnovaj vizioj de eminentuloj en la Esperantio. Sed tiel la afero ne estis. La monda situacio estas nun en transira periodo kaj la dokumentoj de la Kampanjo 2000 bone spegulas tiun interesan fazon en la monda historio.

Ĝis nun la plejmulto de E-aktivadoj estas faritaj de unuopaj esperantistoj. Tion oni povas konstati ekzemple el la E-literaturo. La monda literaturo post Zamenhofa periodo estas tradukita Esperanten nur fragmente, ekzistas grandaj truoj ĉe multaj gravaj naciaj verkistoj. Tion kaŭzas la intereso, tradukopovo kaj ekonomiaj aferoj de unuopaj E-tradukantoj. Ne estis ĝis nun grandaj instancoj en- aŭ ekstermovadaj kiuj povis malŝpareme tradukigi sistemike ĉefverkojn de la mondliteraturo en Esperanton. En Esperantio ne ekzistis ĝis la Kampanjo 2000 ĝenerallaj projektoj, kiuj plivastigis la laborkampon enmovadan ekstermovaden.

Mi ne estas kontraŭ tiaj unuopuloj kiuj faras gravan E-laboron kaj eĉ investas sian monon al publikigado de la fruktoj de siaj projektoj. Sed nuntempe tio ne povas esti la ununura kutimo fari internacian kunlaboron. E-movado povos konservi sian modestan sintenon ankaŭ dum partopreno al projektoj de egaj mondvastaj organizoj. Mi pensas ke

per modesteco tiel eta komunumo kiel E-parolantoj povus profiti multon el kunlaboro de UNO kaj UNESKO. Ekzemple rilate al E-lingvoinstruado.

Mi pensas, ke la prestiĝo de Esperanto ne povas esti plialtigita per amaskomunikilaj rimedoj. Cetere, ekzemple reklamado kiel plibonigilo je la renomo de Esperanto estus tro multekosta. Ofte estas demando pri tio, ke oni eĉ neniam aŭdis la vorton Esperanto. Kian opinion la publiko povus havi pri tiel margena fenomeno, ke ĝi estas preskaŭ imagina. Mi persone havas spertojn, ke nuntempaj junuloj neniam aŭdis ion pri Esperanto. Per internacia kunlaboro en projektoj kun grandaj mondvastaj organizoj ni esperantistoj povus eliri el tiuj ŝrankoj, en kiuj ni pro longa tempo enkaŝiĝis.

Marko Rauhamaa informis novaĝgrupanojn de <soc.culture.esperanto> antaŭnelonge, ke lia E-kurso por anglalingvaj komencantoj bezonus nepre novajn instruistojn regantajn bone la anglan. Lian kurson partoprenas nuntempe pli ol 200 lernantoj. En Sanktpeterburgo estas manko de profesiaj E-lingvoinstruistoj. Ni povus ĉi-tie en Finnlando kolekti spertojn pri konkretaj rezultoj de la Kampanjo 2000 ĉie en la mondo kaj ŝanĝi nian laboron laŭ la ideoj, kiujn la konkretigo de la Kampanjo 2000 naskas. Estas saĝe lerni pri laborprocezoj de aliaj.

Aimo Rantanen

Pli aktive, pli malfermite, pli organizite...

En la tutmonda Esperanto-movado komenciĝis kampanjo 2000, kiun ankaŭ ni en EAF niaflanke partoprenas. Temas pri kampanjo doni pliajn aktivecon, malfermitecon kaj organizitecon al la movado okaze de la jarmila ŝanĝiĝo. La nova jarmilo estas en si mem bona okazo komenci ion novan kaj evidente tiuspecaj kampanjoj estas lanĉitaj en diversaj tutmondaj organizoj. Nia pli ol centjara movado certe bezonas nun kiel ĉiam de tempo al tempo diskutojn pri tio, kion ni celas kaj kiel ni intencas atingi la celojn.

La estraro de EAF konsideris la kampanjon en siaj diversaj diskutoj kaj kunvenoj. Ni tamen ne ĝis nun faris certan planon por la kampanjo. Tio ne signifas, ke EAF ne volas kontribui. Efektive en la estraro ni jam vidis samspecajn bezonojn, kiujn substrekas la kampanjo kaj klopodas daŭre trovi praktikajn elpaŝojn, kiuj konduku al celoj, kiuj kongruas kun la kampanjo 2000.

Kiam nun niaj financoj estas sur sufiĉe certa bazo, ni ankaŭ kuraĝas komenci projektojn, kiuj antaŭe ne estis efektiveblaj. Tion montru ekz. niaj lastatempaj partoprenoj en diversaj foiroj, informado, kiu ankaŭ daŭros. Por preti turni sin pli multe al la ekstera mondo la interna laboro devas esti sufiĉe bone organizita. Pro tio ni lastatempe komencis verki konsilarojn pri diversaj funkcioj de la asocio kaj komencis organizi la laboron okazi en grupoj, kiuj respondecas pri certaj fakoj. Necesas krome klerigi kaj la aktivularon kaj ordinarajn membrojn pri movadaj aferoj ktp. Tion ni faru okaze de niaj aranĝoj aŭ laŭbezone havu apartajn klerigajn aranĝojn.

Bonan ekzemplon pri tio donis la tre sukcesa Eduka semajnfino en Jyväskylä.

Nia informado al la granda publiko mankis

ĝis nun certan planitecon. Ni celu al tio, ke EAF regule informu amaskomunikilojn pri tio, kio nova okazis kaj okazos en la movado en Finnlando kaj tutmonde. Kiel mi diris alifoj, nia sola ebleco trovi novajn interesitojn ekster niaj propraj parencaj kaj konatulaj rondoj estas, ke ni donos sufiĉe allogan, sed tamen realan imagon pri Esperanto.

Por povi oferti ion al interesitoj, ni devas prizorgi pri sufiĉa kvanto de pretaj instruistoj kaj lokoj, kie eblas aranĝi kursojn. Kaj por servi al interesitoj, kiuj volas memstare lerni la lingvon ni prizorgu la daŭron de la leterkursoj. Gravas ankaŭ la havebleco de lernomaterialoj.

Jen kelkaj niaj laborkampoj, kiuj povas esti en nia kampanja plano. Kiel ofte dirite, estas pli facile plani ol labori, sed ankaŭ bone planita estas duone farita. Aliflanke la celoj ĉiam devas esti sufiĉe altaj. Estas la tasko de la estraro de EAF organizi la laboron kaj trovi homojn por fari taskojn – kompreneble la estraranoj mem ankaŭ laboras. Sed plej grave: ni ne forgesu ankaŭ labori, ĉar nur tiel ni povas atingi niajn celojn.

Dezirante al ĉiuj legantoj bonan alproksimiĝantan aŭtunon mi bonvenigas vin al niaj aranĝoj kaj bonvenigas viajn opiniojn kaj iniciatojn. Mi estas ĉiam preta por aŭskulti vin kaj viajn ideojn.

Jukka Laaksonen

Dankon

Elkoran dankon al ĉiuj kluboj kaj individuoj, kiuj sendis aŭ portis siajn bondezirojn pro mia transiro al la “aro de plenkreskaj viroj”. Mi kredas, ke la aĝo instruas kaj esperas, ke tio helpas min en mia laboro. Ni kune laboru por Esperanto!

Jukka Laaksonen

Esperanto-multimediaa suomeksi

Matti Lahtinen on saanut valmiiksi 2 vuoden urakan jälkeen ensimmäisen suomenkielisen ja samalla suomalaisen Esperantoa esittelevän multimedia-teoksen. Onnittelut hänelle loppusuoritetusta projektista, josta ollaan kiinnostuneita myös ulkomailla. Tässä Matti Lahtisen haastattelu.

Haluaisin tietää, kuinka kauan kulutit aikaa projektisi parissa.

Aloitin syksyllä 1996. Tunteja en ole laskenut, mutta paljon aikaa siihen on mennyt. Toukokuun alusta olen tehnyt sitä joka päivä.

Mikä on multimediateoksen nimi?

CD:n kannessa on teksti ”Esperanto – palveleva kansainvälinen kieli”.

Pidän tätä demoversiona, jolla toivon saavani tukea täydentämiseen ja parantamiseen.

Mitä se pääpiirteissään sisältää?

Yleiskatsaus esperantoon. Esperanton historia Suomessa ja kansainvälisesti. Suunnitellut kielet. Esperantojärjestöt. Käyttö matkailussa. Esperanto ihmisten yhdistäjänä. Lehdistö, radio, Internet. Kirjallisuus ja elokuva. Näytteitä esperantosta: lauluja, Kalevalaa. Esperanto kielenä (luonnehdinta).

Mukana ovat laulut äänitiedostoina, n. 300 kuvaa, yksi videoleike. Sivuja on 124.

Alunperin CD:lle suunniteltu kielen multimediakurssi (suomeksi) jäi pois, koska ei löytynyt esperanton opettajaa auttamaan.

Ja oletko löytänyt muita kuin EAF:ta sitä kopioimaan?

Ulkomailla on oltu kiinnostuneita. Toistaiseksi teos on suomeksi, mutta mahdollisesti käänän sen esperantoksi.

Koska esperantistit usein pakertavat yksin tämäntyyppisten projektien parissa, mitä neuvoa antaisit heille?

On huolehdittava siitä, että muut ymmärtävät, mitä ollaan tekemässä. Ihmiset eivät yleensä omaehtoisesti auta, eivätkä tule maininneeksi mitä käyttökelpoista materiaalia heillä on hallussaan, jos eivät tarkkaan tiedä, mistä on kysymys. Apua olen saanut osatessani tarkkaan pyytää mitä kirjaa tms. etsin. Olisi löydettävä oikeat ihmiset.

Lähteiden ristiriitaisuudet, aukollisuus ja huolimaton tekeminen ovat ongelma. (Toivottavasti tietotekniikan avulla materiaali saadaan joskus hyvään järjestykseen ja jopa kaikkien ulottuville Internetin kautta).

Kannattaa varmistaa resurssit heti aluksi. Jatkuva säästäminen teettää kovasti lisätyötä. Motivaatiota pitkäkestoisessa projektissa on myös vaikea säilyttää, jos ei saa usealta taholta tukea, edes henkistä.

Avustajat ovat tarpeellisia, koska tekijä ei voi nähdä teosta sitä ennestään tuntemattoman silmin ja sokeutuu puutteille.

Mikä muisto tai sattuma jäi sinulle päällimmäiseksi mieleen tästä projektista?

Kylmä hiki 30. version jälkeen teosta avattaessa: virheilmoitus ”tiedosto voi olla vaurioitunut” kun viimeisestä talletuksesta oli kulu-
nut viikko ja oli työskennelty täysiä päiviä. En kuitenkaan löytänyt teoksesta mitään vikaa – en vielääkään.

Haastatteli: Aimo Rantanen

Norda tipo de vaporaj banejoj

Furo & Saŭno

Ekspozicio en la Provincmuzeo

de Mez-Finnlando

Alvar Aallon katu 7, 40600 Jyväskylä

Malfermita mardo-dimanĉo 11.00-18.00.

Lunde fermita.

Ĝis la 13-an de septembro

La popoloj en ĉiuj partoj de la mondo purigis sin aŭ banis per multaj variaj manieroj. Irlandanoj havis sian *ty falluis* "la domo de ŝvito", meksikaj indianoj *temascal*, la nordamerikaj indianoj ŝvittendon, la turkoj *hammam*, la vaporbanon, la japanoj *furo*, la banon en akvo varmega je 40-42C, kaj la finnoj la saŭnon. La finna saŭno prezentas la nordan tipon de vaporaj banejoj, japana *furo* estas parto de bantradicio populara en la sudo. Banado ne nur faris la banantojn puraj, sed ĝi estis parto de religiaj ritualoj, per banado oni kuracis malsanojn kaj per ĝi oni malstreĉigis la banantojn fizike kaj psike. La banado estis ankaŭ parto de socia vivo. Kvankam mi uzis pasintajn verbformojn, multaj trajtoj antaŭmenciitaj konvenas ankaŭ al modernaj banadmanieroj.

La saŭno eble ekzistas ekde la Ŝtonepoko, antaŭ 6000 ĝis 7000 jaroj. La plej unua saŭnotipo estis simila al la ŝvittendo de nordamerikaj indianoj. En la Bronzepoko oni faris saŭnon en grundon. La prototipo de fumsaŭno ekaperis antaŭ 1500 jaroj, tiam oni komencis fari domojn el ligno. En la mezo de 19a jarcento oni komencis konstrui fumsaŭnojn en la saŭnon. Tiu tipo estis pli sekura kontraŭ la incendio ol la antaŭaj fumsaŭnoj.

Tial oni povis komenci la saŭnokonstruon ankaŭ en urboj.

Nur en la 20a jarcento oni ekis la konstruadon de la saŭno ĉe la akvego, ekzemple ĉe la lagbordo. Ĝis tiam la saŭno estis unu konstruaĵo en la korto. Ekde 1940aj jaroj oni komencis amasproduktadon de elektraj saŭnostovoj. Sed ĉiuj stovtipoj ekzistas unu apud alia en Finnlando, ekzemple fumsaŭnoj oni kalkulas 5000. Dum la milito oni saŭnumis en saŭnotendoj, tio estas inventaĵo de prafinnoj. Grundsauoj ankaŭ ekzistas, eble



Antaŭjuĝo

Mi posedis dum jaroj romanon “Laktisto de Mäeküla” de estona verkisto Eduard Vilde (1865-1933), tradukita de Valev Kruusalu – ĉiam pensante, eble mi iun fojon legos ĝin, mem dubante kaj formetinte ĝin flanken. Du jaroj ĝi restis en mia somerdometo, ne alloge al mi.

Pasintsomere mi havis eblecon viziti Saarenmaa kaj tri etajn insulojn Vilsandi, Abruca kaj Kihnu, kune kun naturprotekta societo. Profunde ni konatiĝis kun la bela naturo kaj folkloro en okcidenta parto de Estonio. Ĉi-jare la E-Klubo de Helsinki faris semajnfinan viziton al Tallinn kaj unutagan konatiĝon al la nordorienta parto de Estonio, ĉefe al Lahe-
maa-naturparko.

Nian etan grupon lerte gvidis August Kilk donante al ni neforgeseblajn travivaĵojn pri kulturo kaj naturo. Revenante hejmen mi ofte meditis, kiel malmulte oni konas la kulturon de la najbara lando. En Helsinki unu amikino pruntis al mi tri finlingvajn librojn kaj inter ili estis unu, kiu enhavis mapon de Estonio. La mapo vekis mian intereson kaj tuj mi komencis legi la libron de Eeva Niinivaara: Yhä paistaa sama aurinko. Elämää nuoruuteni Eestissä ja Suomessa.

Kaj nun mia intereso estas vekita pri literaturo de Estonio. Mi ekmemoris tiun ĉiam flankemetitan libron en la somerdometo. Ĝi estas nun nekredebla trezoro por mi. “Laktisto de Mäeküla” estas romano pri Tõnu Prillup, kies ĉefa problemo estas la deziro fariĝi bonstata je ajna kosto. Ankaŭ la romano rakontas pri juna edzino Mari, kiun Prillup sukcesas svati al si, fratino de mortinta edzino kaj mastrino kaj zorganton pri siaj du infanoj kaj pri maljuna fraŭlo Ulrich von Kremer, la posedanto de nobelbieno.

Ilij interrilatoj estas bele kaj bone priskribitaj, tute kiel Eduard Vilde volis lasi al la leganto liberan fantazion por pensi mem kio okazis. Mi vivis kun Mari, kiam ŝi ludis kun infanoj, frapetis fenestron de la nobelbieno. Mi sidis en la sledo apud Tõnu en tiu fatala nokto, mi sekvis Ulrich von Kremer dum promenadoj, mi flaris herbokovritajn kampojn. Kiel mi povis antaŭe havi tiel fortajn antaŭjuĝojn pri tiu romano, kiu nun ekokupis mian tutan atenton?

Anna-Liisa Heikkinen

Nobelbieno = moisio (kartano)

oni ne saŭnumas en ili, sed ili estas arkeologiaj restaĵoj. Finnoj havas ankaŭ hodiaŭ ion religian rilate al la saŭno. Tial la saŭno ne iĝis rendevuejo por gejoj kiel ekzemple la saŭnoj en Germanio.

Aimo Rantanen

Por tiuj, kiuj ŝatas saŭnon, ekzistas la rondo **Amikoj de saŭno**. Kontakto: Pentti Makkonen, Ansapolku 1, FIN-40630 Jyväskylä, Finnlando.

Intervjuo kun Joel Brozovsky

Antaŭ la Somera Aventuro, kie Joel Brozovsky instruis, li partoprenis la Edukan semajnfino de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj en Jyväskylä kiel simpla kursano. Malgraŭ la tre intensa kursoprogramo, Raita Pyhälä havis la honoron intervjui lin tie la 26an de junio 1998.

Joel, vi laboras en Japanio de 10 jaroj instruante Esperanton. Kial vi elektis Japanion?

Verdire mi ne elektis Japanion, sed Japanio elektis min. Mi volis provi vivi en lando, kie oni ne parolas anglan lingvon, kaj unue mi venis de Usono al Eŭropo. Kiam brita esperantisto volis reveni de sia laboro en Japanio, aperis la ebleco dungigi ĉe Oomoto, pri kiu mi estis jam aŭdinta kaj kies revuo impresis min. Mi ne tuj decidis resti en Japanio sed pasigis 6-7 semajnojn en Koreio kaj pripensis la decidon. Poste mi reiris al Japanio.

Ĉu vi instruas ankaŭ la anglan?

Ne, tute ne. Kaj mi neniam parolas pri LA angla lingvo, ĉar ekzistas tiom da diversaj specoj de angla lingvo.

Kiom aĝaj estas viaj lernantoj?

Mi havas tutan gamon de aĝoj. Kelkaj kursoj estas por infanoj, kiuj havas 7-12 jarojn, aliaj kursoj estas por plenkreskuloj. Mi ŝatas paroligi ĉiujn kaj malstreĉigi la etoson, kiu precipe en Japanio kelkfoje estas iom tro serioza. La studentoj hezitemas kaj tre timas erarojn. Parte kulpas iliaj antaŭaj instruistoj, kiuj tro forte intervenas, se la lernanto misuzas la lingvon. Mi volas esti kontraŭpezo al troa seriozeco.

Jes, sur via T-ĉemizo mi vidas la sloganon "Amike, Aktive, Amuze"...

Estas korea slogano. Mi ofte vizitas Koreion kaj instruas tie. Koreoj estas gajaj kaj parolemaj.

Ĉu en viaj japanaj klasoj partoprenas ankaŭ alilandanoj?

Jes, de tempo al tempo mi havas lernantojn el 5-6 landoj. Inter la koreoj kaj japanoj lernas usonano, brito, ĉino, mongolo... Homoj ofte volas aliĝi al Esperanto-kurso, kiam ili rimarkas, ke post 2-3 monata lernado la lernantoj multe pli senĝene parolas en Esperanto ol la studentoj de la angla post 2-3 jaroj.

Kio en Oomoto-kursoj estas pli grava, Esperanto aŭ la ideoj de Oomoto?

Oomoto ege instigas homojn lerni kaj studii, ĉu Esperanton, ĉu arton aŭ alian. Sed por Oomoto-ano, la plej grava estas la Oomoto-ideo, nur poste venas la aliaj fakoj.

Kion signifas la vorto Oomoto?

Granda origino.

De kio?

En la nomo ne estas klare, pri kio temas tiu origino. Laŭ mia nekompleta kompreno temas pri la origino de la mondo, sed el spirita vidpunkto.

Ĉu vi instruas nur ĉe Oomoto?

Ne. Ekzemple nun mi ĉiumonate iras al Niigata, en norda Japanio, por kurso, kaj revenvoje haltas en Kanazaŭa por helpi prepari la ĉi-jaran Japanan Kongreson. La prezidanto de la LKK kaj mi preparas unuaktan teatraĵon por prezenti en la Kongreso, la 4-an de oktobro.

Dankon al vi, Joel, pro la interesa intervjuo!

Raita Pyhälä

Intervjuo kun Márta Kovács

Hungarino Kovács Márta instruis la 14 partoprenantojn de la Eduka semajnfino en Jyväskylä 26.-28.6.1998. Ŝin intervjuis Raita Pyhälä, prezidanto de Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj.

Márta, bonvolu diri ion pri la nuntempa instruado de Esperanto en Hungario!

La situacio multe sanĝiĝis kompare al la situacio antaŭ dek jaroj. Tiam ni ne havis sufiĉe da instruistoj pri la angla kaj multaj

tato. Ni ne uzas libron, kaj la instrumentadojn mi elektas laŭ la situacioj.

Sed E-o ne estas via ĉefa instrufako, ĉu ne?

Ne, mi instruas la francan de la komenco ĝis la abituriĝo, unue laŭ hungarlingva lernolibro, sed en la postaj jaroj laŭ unulingva franca libro.

Ĉu vi en via lernejo havas komputilojn kaj rajtas uzi ilin por lingvolernado?

Jes. Nia lernejo disponigas 16 komputilojn

al la lernantoj, kaj ni havas kelkajn programojn por lingvolernado. Miaj klasoj estas konvene malgrandaj, por ke ĉiu lernanto povu sendepende profiti de sia komputilo.

Ĉu vi fojfoje instruas eksterlande?

Jes. Mi instruis Esperanton en Bulgario en la 80aj jaroj dufoje, kaj ankaŭ en Jy-

väskylä mi jam foje instruis dum semajno pretiganta la kursanojn al la ekzamenoj de UEA.

Kiujn personajn ĝojojn vi havas en via laborplena vivo?

Renkontojn kun interesaj homoj...

Fine de la intervjuo Márta surprize eltiras el ie bukedon de bonodora blua lavendelo, kiun ŝi portis al Finnlando de sia propra hungara ĝardeno.

Raita Pyhälä



lernantoj elektis Esperanton, kiu estis normale instruata en 6-7 lernejoj ĝis abituriĝo. Nuntempe Esperanto estas instruata en eble 2 lernejoj. Multo dependas de la direktoro de la lernejo. Ni ne havas forton ŝanĝi la situacion, kaj la instruistoj ne nepre estas salajritaj.

Kaj pri via propra Esperanto-instruado?

Mi instruas grupon de 5-10 lernantoj, 2 horojn en semajno. Ili estas 16-17 -jaraj komencantoj. Esperanton ili studas, ĉar pro ĝi ili havos poenton en la akcepto al universi-

Eduka semajfino en Jyväskylä 26-28.6.98

Mezaĝa urbetanino sidas pripensante en aŭtobuso. Ŝi antaŭvidas grandajn malfacilaĵojn, ĉar ŝi aliĝis al kurso, kiu superos ŝian kapablon. La celgrupo estas esperantistaj instruistoj kaj instruantoj, la uzota lingvo Esperanto. La urbetanino trovas sin duobla komencanto. Ne, ŝi ne volas pensi pri tio nun. Estas agrable nur sidi kaj rigardi belan someran naturon. Preskaŭ je la celo. Post mallonga atendado alvenas loka buso kun helpema ŝoforo. Nia urbetanino baldaŭ staras apud sia kursejo, Kristana popolaltlernejo. Ŝi konstatas bonan atmosferon. Ĉio bone! Sed poste – la oficeja pordo estas fermita, tute fermita, neniu ie videblas. Ŝajnas, ke la tuta loko estas fermita kaj malplena. Ĉu eblus tendumi, ĉar estas bele kaj varme? La urbetanino feliĉe ekvidas etan slipon: “Se la pordo estas fermita, serĉu...”. Ŝi serĉadas, sed ne trovas. Ŝi tamen ne havas tempon maltrankviliĝi, ĉar proksimiĝas du spertaj organizantoj kun pezaj nutraĵosakoj. Ankaŭ aktivistoj devas iam iom manĝi.

Kurskamaradoj, entute 14 partoprenantoj, alvenas. Inter ili troviĝas tri eksterlandanoj: norvego, germanino kaj usonano, kiu nuntempe loĝas en Japanio. Ĉiuj prezentas sin, sed la interpretado estas interrompita per la alveno de la kursinstruistino, Márta Kovács, sperta lingvoinstruistino el Hungario. Bonan nokton!

Sabatmatene, post bongusta matenmanĝo, komenciĝas la instruado. La kursanoj ricevas precizan programon kaj alian paperon kun multaj bonaj enkondukaj demandoj. Brilokula Márta parolas flue kaj rapide. Ŝi mimas vigle uzante ne nur sian buŝon, sed ankaŭ siajn manojn kaj tutan korpon. Kelkaj kursanoj havas similajn talentojn. Parolado fluadas rapide, rapidege. La urbetanino de tempo al tempo sentas kapturton, sed ŝi ĝuas aŭskulti la senĝenan, esperantlingvan diskutadon. Neniam antaŭe ŝi

aŭdis tian. Ŝi estas kontenta, ĉar ŝi komprenas, almenaŭ ŝi kredas, ke ŝi komprenas, multe, multe pli ol ŝi kuraĝis esperi.

Kelkfoje ŝi suspektas, ke ŝi estas problemo al aliaj kursanoj, ĉar ili estas en tute alia nivelo. Ĉiuj tamen estas afablaj kaj kuraĝigaj. Varma vespero. Oni sidas ekstere, kunkantas, ludas, ridas. Esperantistoj bezonas neniun apartan ridterapion, almenaŭ ne tiuj ĉi. Instruado certe estas grava afero, sed instruistoj ne devas esti seriozuloj. Vivu bona humuro!

Sabato estis pli malpli teoria. Dimanĉo estas pli konkreta. La urbetanino komencas laciĝi. Ŝi ĉiam malbone dormas en nekonata ejo, kaj ŝi ne havas forton sekvi ĉiutempe. Estas tro da aferoj, tro rapida takto. Gruplaborado. Ho, ve al ŝiaj kompatindaj geparuloj! Kiam ĉio komencas preterruliĝi, ŝi subite ekkaptas. Ŝi ekkomprenas tute klare, kiel grava estas la instruista rolo meze de ĉiaj instrumaterialoj kaj metodoj. Scio ja ĉiam ekzistas. Instruisto serĉas kaj kolektas plej eble multe da scio kaj peras tiun scion al la lernantoj. Kiel bone ŝi/li sukcesas en sia laboro, multe dependas de ŝiaj/liaj inteligenteco, krea talento, entuziasmo, fantazio kaj intuicio. Tempo urĝas.

La unua eduka semajfino finas. Oni esperas, ke la unua ne estos la lasta. Atestiloj, fermo. La urbetanino atendas aŭtobuson. Ŝi havis agrablan, utilan travivaĵon. Ŝi lernis multe kaj kontaktiĝis kun interesaj homoj. Ŝi kredas, ke ŝia unua partopreno estis sukceso. Ŝi paŝis plurajn paŝojn antaŭen en la internacia mondo esperanta. La buso ekiras.

Maljuneta, parolema sinjorino volas diskuti kun nia urbetanino. Estas malfacile paroli la finnan.

Verkis Marketta

Novajoj el la Universala Kongreso en Montpellier

Kiel UEA-prezidanto elektiĝis **Keppel Earl Enderby**, aŭstralia ŝtatisto, juĝisto, advokato kaj ministro 1972-75 en la aŭstralia registaro. S-ro Enderby interesiĝas laŭ la raportistino de Pola Radio pri la projekto LINGUAPAX kaj plivastigi kunlaboron de UEA kun SAT. Estraro havas nun la unuan estraranon el Afriko, togolandanan **Gbgelo Koffi**. Ankaŭ finna **Kalle Kniivilä** apartenas nun al la estraro de UEA. Gratulojn! **Anja Karkiainen**, kiu neniam antaŭe estis laŭreato en Belartaj Konkursoj de UEA, gajnis nun la unuan premion en la branĉo poezio. Gratulojn ankaŭ al ŝi!

Pro Esperarto ry

Pro Esperarto ry. tukee yhteiskunnallista toimintaa joka tähtää

- ♦ yksilöllisen henkisen vapauden ja luovuuden kunnioittamiseen ja suvaitsevaisuuden kasvattamiseen yksilöllistä erilaisuutta kohtaan

- ♦ sosiaalisen tasa-arvon ja inhimillisen vuorovaikutuksen ja solidaarisuuden edistämiseen

- ♦ ekologiseen asennoitumiseen ympäristöä ja taloudenpitoa kohtaan, ihmiskunnan yhteinen hyvä ja kestävä kehitys huomioon ottaen

Pro Esperarto ry

- ♦ Etsii taiteellisia ja samalla käytännöllisiä ratkaisuja aikamme erilaisiin kipeisiin ongelmiin joita voisi kiteyttää käsitteeseen “sosiaalisen organismin sairaus”

- ♦ järjestää mm. kansainvälisiä tapaamisia joissa harrastetaan sosiaalista ja ekologista taidetta ESPERARTOA

- ♦ kannattaa puolueettoman kansainvälisen kielen ESPERANTON tuntemisen, opiskelun ja käytön edistämistä kansainvälisissä yhteyksissä

Ali-Seppälän tila, Orimattila

Pro Esperarto ry toteuttaa tarkoitustaan mm. kehittämällä talkoilla Ali-Seppälän tilaa luonnonläheiseksi “terveen toiminnan tilaksi” missä voi viettää aktiivista lomaa osallistumalla vaikka ekologisten ESPERARTO-tilataideteosten tekemiseen ja tutustua ESPERANTOON.

Ali-Seppälään voi myös tulla retkelle. Itsepalvelukeittiö sekä grillipaikka ovat vieraittemme käytettävissä. Sopimuksen mukaan tarjoamme myös pullakahvia ja pientä syötävää. Vaatimaton yöpyminen on myös mahdollinen. Ja tietysti lämmin sauna! Järvenrantaa meillä ei valitettavasti ole.

Tervetuloa! Ilmoita etukäteen tulostasi, ole hyvä!

Pro Esperarto ry – Ali-Seppälän tila, Keituriintie 274, 6510 Luhtikylä, puh. (03) 785 1191, s-posti: <esperarto@dlc.fi>.

Matkailuesite

Pohjois-Norjasta

Oletko aikonut tehdä matkan Pohjois-Norjaan, Varanginvuonon seudulle? Vadsø (suomeksi Vesisaari) kunta on yhdessä Norjan Esperantoliiton kanssa valmistanut esperantonkielisen esitteen. Sitä saa Ole Fredrik Holm Jenseniltä, Peder Norviks gt. 9, N-9800 Vadsø, s-posti: <ole.fredrik@fm.telia.no>.

Internacia fotokonkurso

La redakcio de “La Ondo de Esperanto” kaj Urala Esperantista Societo invitas al partopreno en la internacia fotokonkurso. La konkurso ne estas ligita al deviga temo. En la konkurso rajtas partopreni ĉiu deziranta fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume tri fotoj. La minimuma formato estas 10 x 15 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la redakcia adreso de “La Ondo de Esperanto” (RU-620077 Jekaterinburg-77, ab. ja. 67, Ruslando). La fotoj devas atingi la indikitan adreson antaŭ la 15a de decembro 1998. La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti enmetita slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj, kiuj jam estis publikigitaj.

Tripersona juĝkomisiono (la redaktoro de “La Ondo de Esperanto”, delegito de UES kaj fakulo pri fotoarto) aljuĝos maksimume tri premiojn al la laŭreatoj:

1a premio: du minimumaj ruslandaj salajroj kaj abono al “La Ondo de Esperanto”

2a premio: unu minimuma ruslanda salajro kaj abono al “La Ondo de Esperanto”

3a premio: abono al “La Ondo de Esperanto”

Specialan premion (libroj en la Urala libro-servo kontraŭ ekvivalento de unu minimuma

ruslanda salajro) ricevos la plej bona foto teme ligita kun Esperanto. Ĉiu premiito ricevos diplomon. Ruslandaj laŭreatoj ricevos monpremiojn en ruslandaj rubloj. Alilandaj laŭreatoj ricevos la monpremion per la kontosistemo de UEA en nederlandaj guldenoj.

La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2000 uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

Edition Iltis prezentas sin

Fondita en aprilo 1997 de Irmu Hauptenthal, la eldonejo plu disvendas la titolojn de la antaŭa Iltis-eldonejo funkciita de 1989 ĝis 1997. Jen ĉef-trajte nia aktiveco:

Eldonado:

1. Libroj: originala beletro, tradukita beletro, esperantologio, interlingvistiko.

2. Revuoj: *Akcentoj* (ekde 1998), *Iltis-Infoj* (senkosta eldoneja bulteno por klientoj), *Volapük-Studoj*

- ◆ Guide Iltis (Bio-vinoj en Francujo, Vinkultivistoj kaj restoracioj)

- ◆ Libro-servo

- ◆ Brokantejo

- ◆ Fondaĵo Karolo Piĉ

- ◆ Prizorgo de Planlingva Arkivo, Biblioteko kaj Dokumentejo

- ◆ Iltis-Libroklubo

- ◆ Konstanta aĉeto de planlingvaj heredaĵoj (libroj, revuoj, dokumentoj, korespondoj). Ofertoj bonvenaj!

Bv. peti specimenojn, prospektojn aŭ katalogojn ĉe:

Edition Iltis, Postfach 600130, D-66067 Saarbrücken, tel. & fakso +49.681.816713

Lisätietoja syyspäivien osanottajille

Ajo-ohje: Loma- ja kurssikeskus Marjola sijaitsee Saimaan saassa, 6 km Lappeenrannan keskustasta pohjoiseen. Omilla autoilla saapuvat löytävät parhaiten perille kääntymällä Kouvola – Imatra -tieltä (tie nro 6) Lappeenrannan pohjoispuolella Lauritsala – Kaukas -risteyksestä Vehkataipaleen suuntaan. Marjolan opasteet ovat heti Luukkaansalmen sillan jälkeen. Katso oheista karttaa!

Kuljetus Lappeenrannan rautatie- ja linja-autoasemilta: Marjolan pikkubussi noutaa vain ennakkoon kuljetuksen varan-

neet syyspäivien osallistujat perjantai-iltana 4.9 ja lauantai-iltana 5.9: Muistakaapa siis ilmoittaa saapumisaikanne ja kulkuvälineenne ajoissa Päivi Saariselle


Retki Ylämaan jalokivinäyttelyyn toteutuu. Retkelle ilmoittautuminen viimeistään 15.8. Bussi lähtee la 5.9 klo 9.45 Marjolasta ja klo 10.00 Lappeenrannan rautatieasemalta. Ilmoittakaa Päiville, mistä lähdette mukaan. Retki kestää kaksi tuntia ja päättyy Marjolaan Retken hinta on 60 mk.



*Vasemmalla:
Marjolan ranta.
Alla: opaskartta.*

Korespondi deziras

Mezağa aktiva esperantisto, E-kursgvidanto deziras korespondi en Esperanto tutmonde pri bioenergetiko, turismo, gitara muziko. Vytautas Drasutis, Kestucio 6-3, 5300 Panevezys, Litovio / Lithuania.



Internacia kurso por junuloj en la nordo

NEL invitas junulojn lerni Esperanton en Norvegio. En la t.n. Barents-regiono de nordaj Finnlando, Norvegio, Ruslando kaj Svedio, niaj respektivaj registaroj stimulas lastatempe al translima kontaktado kaj kunlaboro. Sed en tiu regiono renkontiĝas tri tute malsimilaj lingvogrupoj. Tial Norvega E-ligo (NEL) nun direktas sian agadon al la nordo, kaj ĉar Esperanto estas nemulte konata kaj uzata tie, unua paŝo estas aranĝi kursojn.

Fine de septembro, ekde lundo la 28a (semajno 40), la popola altlernejo Svanvik (60 km norde de la trilanda limpunkto Finnlando – Norvegio – Ruslando) aranĝos kvin-tagan internacian kurson por 20 junuloj 16-25 -jaraj. Gvidanto estos la sperta kaj populara 35-jara Atilio Orellana Rojas el Argentino. La kurso estos por komencantoj kaj celas junulojn loĝantaj en la norda (Barentsa) regiono (en Finnlando la gubernio Lappi), kun la celo ke ili poste uzu Esperanton en plua interkontaktado trans la limoj.

Se vi konas kandidatojn, bv. peti ilin turni sin laŭeble baldaŭ al EAF, indikante aĝon, sekson, loĝlokon kaj iom pri ideoj aŭ planoj por estonteca internacia kontakto per Esperanto. Se venos pli da petskriboj ol kiom disponiĝas studlokoj (20), la finan selekton faros NEL. Partopreno kostos 2500 norvegajn kronojn (ĉ. 1800 mk).

Adressanĝo

La nova retadreso de Raita Pyhälä estas <raita.pyhala@lestijarvi.fi>.

Raita Pyhälän uusi sähköpostiosoite on <raita.pyhala@lestijarvi.fi>.

Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio

Celo: praktiki Esperanton en agrikulturo inkluzive bredadon, hortikulturon, arbarkulturon kaj koncernajn sciencojn. Oficejo: Sekretario kaj kasisto de LAEA s-ro HUANG Yinbao. Organo: Internacia Agrikulturo.

Adr: Jingchuan-Xian, Kewei, CN-744300 Gansu, Chinio. Tel.: +86.933.3321004(O) 3322812(H) Ret-adreso: <agrikultura@esperanto.nu>.

Alvoko!

Fondiĝos organizaĵo – post nelonga tempo – kun nomo Astrologa Esperantista Societo. Tial mi serĉas kontaktojn kun tiuj kiuj okupiĝas pri astrologio, aŭ interesiĝas pri la temo kaj tial volonte partoprenus en la laboro de nova societo.

Mi petas la legantojn se ili konas astrologojn esperantistojn bonvolu informi ŝin / lin pri nia alvoko.

d-ro Robert Nagy, profesoro pri astrologio, H-1081 Budapest Köztársaság tér 16, Hungario. Retpoŝte: <AstroEsp@dpg.hu>.

Korespondi deziras

Sola vivanta pensiulino, nask. 1937. Aktiva, volonte diskutas pri ĉiuj temoj, E-komencanto, serĉas korespondamikon aŭ -amikinon en Finnlando. Aksenova Mara, Str. Dimo 5/1-39, 2068 Kiŝinev, Moldova.

45-jara murfarbisto. Kolektas kaj interŝanĝas bild- kaj telefonkartojn, poŝtmarkojn, monerojn kaj monbiletojn. Serĉas gekorespondamikojn en Finnlando. Farkas Antal, Str. Sovata 40 Bl. Q6 Ap. 10, RO-3700 Oradea, Rumania.

Sekve de la artikolo:

“Heredintoj de la zamenhofa homaranismo”

Unue la subskribinto volas esprimi sian respektan dankemon pro la koncerna artikolo, en kiu S-ro Rantanen klarigas la interesajn interrilatojn de la lingvo Esperanto kaj samtempe mencias pri la historiaj faktoj de la alia filino de Ludoviko Zamenhof, nome Lidia kaj pri ŝiaj valoraj servoj kiel diligenta instruisto de Esperanto per la Cseh-metodo kaj ankaŭ ŝian fidelan servon al bahaismo. Kaj nun sekvas la malgranda sed grava rimarko pri religia movado bahaismo mem. Nome membroj de la bahaa movado, laŭ la bahaa vidpunkto, bahaismo ne estas nur saĝa idearo por homoj, kiuj pli ol malpli pensadas sian vivon kaj la signifon de la homa vivo. Bahaaj instruoj volas montri al la tuta homaro, ke ili kaj sia signifo estas kiel rekta inerteco al ĉiuj antaŭaj mondaj religioj, kiuj havas sian Sanktan Libron. Mi ne volus pliajn rimarkojn fari. Nur mi rekomendas al tiuj legantoj de Esperanto-lehti, ke mi nun kun plezuro estas preta sendi, la libron, aŭ pli bone revuon: “Festlibro okaze de 25-jariĝa Bahaa Esperanto-Ligo”, tio ja estas bona legaĵo al ĉiuj, kiuj eĉ ne estas tre interesitaj pri religiaj aferoj, tamen kun intereso studas la movadon de la internacia lingvo Esperanto. Samtempe la teksto klarigas kontente pri la movado kaj historio de la Bahaa Esperanto-Ligo.

Samideane salutante ĉiujn samideanojn Leo Teräntö, Metsärinteenkatu 11 B 7, 15210 LAHTI. Puh.(03) 7330 405.



Zamenhof-piedestalo kiel monumenton?

Zamenhof-piedestalo en la Parko de varmaj akvoj de Barra do Garças, inaŭgurita en la 22a de aprilo 1995, okaze de solenaĵoj omaĝe al la Tutmonda tago de la tero. Nia s-ano Ciro Gomes de Freitas lerte ellaboris skizon por ke la piedestalo fariĝu monumento, en la sama parko.

Nu... por pli forte entuziasmigi nian urbestron, bv leterumi aŭ sendi PK-on al li: Dr. Wanderley Farias, Prefeitura municipal, BR-78600-000 Barra do Garças-Mt, Brazil.

Amarilio Carvalho



La estraro kunvenis

La estraro de EAF kunvenis dum la estrarseminario en Evo la 30-an kaj la 31-an de majo 1998. Ĉeestis ĉiuj estraranoj kaj vicestraranoj krom Kimmo Hakala kaj Jussi Jäntti. La kunsidon partoprenis ankaŭ la revizoro Tiina Oittinen. La duparta kunsido daŭris 5 horojn kaj 10 minutojn. Ekster la kunsido dum la semajnfina seminario estis traktitaj membroferoj, kampanjo 2000, financoj, lerniloj kaj EU-agado.

Estis informita, ke en la oficejon alvenis du vidbendoj kiuj enhavas la kvar unuajn lecionojn de la esperantokurso "Esperanto – Pasporto al la tuta mondo".

La estraro decidis uzi servojn de PTV-Kirjas-*topalvelu* kiel distribuanto de libroj Kalevala, Muminvalo, Jen nia mondo, Kie boacoj vagadas, la vortaro kaj Esperantolehti.

Praktikaĵoj de Aŭtunaj tagoj de Lappeenranta kaj Vintraj tagoj de Tampere estis traktitaj.

La estraro akceptis proponon de Matti Lahtinen por kompaktdiskigo de provekzempleron de multimedia verko pri Esperanto.

La estraro decidis havigi el Telehallintokeskus

registradon por interretaj paĝoj de EAF sub adreso *esperanto.fi*.

La estraro decidis pri partopreno de EAF en Vanhan kirjallisuuden päivät de Vammala por venonta aŭ sekva jaro. Praktikaĵojn prizorgos Esperantoklubo Antaŭen.

La estraro decidis aranĝi kantovesperon en la oficejo dum Nokto de artoj en Helsinko la 27-an de aŭgusto 1998.

EAF partoprenos la librofoiron en Turku la 16.-18.10.1998 aranĝante ekspozicion pri Esperanto en la formo de hejma salono. Esperanto-societo en Turku prizorgos praktikaĵojn kiel deĵorantojn.

La estraro akceptis havigon de 1000 ekz. de skribiloj por reklammaterialo. La skribiloj surhavas nomon kaj adreson de EAF.

EAF instigas membroklubojn okazigi E-temajn aranĝojn dum Agotago la 3-an de oktobro 1998. Jukka Pietiläinen faros gazetaran komunikon antaŭ la agotago.

La sekva kunsido okazos en la oficejo en Helsinko la 15-an de aŭgusto 1998.

EAF:n kirjasto käytettävissä

EAF:n toimistossa on runsas kokoelma esperantonkielistä kirjallisuutta, n. 1000 teosta. Anna-Liisa Heikkinen on luettellonut kirjat aihepiirien mukaan. Kokoelmiin kuuluu esim. esperanton oppikirjoja, proosaa, runoja ja tietokirjallisuutta – maantietoa, matkailua, historiaa, politiikkaa, terveydenhoitoa... Mainittakoon, että ryhmässä Esperantaĵo on 90 esperantoliikkeen historiaan ja toimintamuotoihin perehdyttävää teosta. Kielitaidon kartuttamisesta kiinnostuneille kirjastosta löytyy varsinaisten oppikirjojen lisäksi kielen opiskelua tukevaa lukemistoa. Oppikirjoja ja lukemistoa on runsaat 100 teos-

ta. Lapsillekin on tarjolla niin oppikirjoja kuin satuja kymmenittäin.

Kirjaston kokoelmia kartutetaan tarpeen ja mahdollisuuksien mukaan. Myös kirjalahjoitukset ovat tervetulleita. Uushankinnoista on tarkoitus tiedottaa Esperantolehden välityksellä.

Kirjastoon voi tutustua toimiston aukioloaikoina.

EAF:n hallituksen hyväksymät lainausehdot

Kirjasto on esperanton harrastajien ja esperanton kielestä kiinnostuneiden käytettävissä seuraavin ehdoin:

Kirjaston kirjat ovat lainattavissa lukuun ottamatta sanakirjoja ja EAF:n hallituksen erikseen nimeämiä teoksia.

Lainausaika

Lainausaika on yksi kuukausi tai sopimuksen mukaan. Lainausaikaa voi pidentää kirjeitse tai toimiston päivystysaikana puhelimitse.

Kotimaan kaukolainoissa lainaaja maksaa toimituskulut.

Ulkomaille kirjoja lainataan vain erityistapauksissa.

Lainausvihko

Lainausvihkoon merkitään lainauspäivä, teoksen nimi, aiheryhmä ja lainaajan yhteystiedot. Aiheryhmän merkitseminen helpottaa palautekirjan asettamista oikealle paikalleen hyllyssä. Helsingin Esperantoseuran jäsenille ja muille tunnetuille henkilöille riittää yleensä puhelinnumeron ilmoittaminen.

Kadonneen kirjan korvauksen suuruudesta tai korvaustavasta päättää EAF:n hallitus.

Vastuuhenkilö ja tämän tehtävät

EAF nimittää vastuuhenkilön, joka

1. valvoo kirjojen palauttamista (tarkastus ja muistutusten lähettäminen vähintään neljästi vuodessa)

2. huolehtii kirjastoluettelon päivittämisestä ja niiden teosten luettelosta, jotka eivät ole vapaasti lainattavissa

3. huolehtii uutusteoksista ilmoittamisesta Esperantolehdestä (lyhyt esittely teoksesta)

Kirjaston kokoelmien kartuttaminen

Jäsenistö voi tehdä ehdotuksia kirjastoon hankittaviksi teoksiksi. Hankinnoista päättää EAF:n hallitus. Myös kirjalahjoituksia vastaanotetaan.

Ohjeesta tiedottaminen

Kirjaston käyttöä koskevista ohjeista tiedotetaan Esperantolehdestä.

Hallituksen nimeämänä vastuuhenkilönä toimii Ritva Sabelli.

Kompaktaj diskoj al la diskoteko de Finna Radio

Ĉijare en majo turkuaj esperantistoj donacis al la diskoteko de la Finna Radio du kompaktajn diskojn, por esti uzitaj ekzemple en bondezirkoncertoj. De la diskoj la unua portas nomon KAJTO, kiu enhavas pecojn komponitaj de Nanne Kalma kaj M. Nesse al poemoj de plej konataj E-poetoj, kaj la alia “Bulgaraj artistoj kantas en Esperanto/ Esperanto & Esperanta Turismo”, kies B-flanko enhavas kantojn de la Ĉambra Koruso “Esperanto”.

Pri alia donaco al diskoteko de la Finna Radio la redaktejon de Esperantolehti informis perletere usona kantistino Alberta Casey: “Mi ĵus donacis la CD Estu Sur Tero Pac’ al la radioservo YLE. Mi metis la du diskojn “Al Vi De Mi” kaj “San Diego Vokas” kune, tridek kantojn en Esperanto kaj nomis ĝin, “Estu Sur Tero Pac’”. Ĝi inkluzivas internaciajn kantojn kiel Volare, Aloha Oe, Besame Mucho, Yesterday, Edelweiss, Estu Sur Tero Pac’ ktp. La vortoj de la kantoj inkluzivas. Mi estas la kantistino kaj ĝi estis farita en Usono tute en la lingvo de Esperanto. Sincere, Alberta Casey.”

La donacitajn pecojn oni povas aŭskulti per partopreno al bondezirkoncertoj de la Finna Radio. Radio Suomi -kanalo havas ekzemple dimanĉe la Sävallahja-koncerton kaj vendrede la dezirkoncerton “Puhelinlangat laulaa”. Oni povas sendi peton pri dezirita peco al Radio Suomi PL 90, 00024 HKI aŭ telefone al servnumero de Radio Suomi 0600-17600. Oni povas peti deziritan pecon per Interreto sur la TTT-paĝoj www.yle.fi.

Aimo Rantanen

dankon al Raita Pyhälä kaj Anna-Liisa Ali-Simola

Biblioteko – Novakiroj

En la oficejo de EAF estas deprunteblaj jenaj novakiroj:

Apenaŭ papilioj en Bergen-Belsen. Originala romano pri Germanio. Trevor Steele (1940). Vieno: Pro Esperanto, 1994. 148 p. Romano pri la spertoj de juna anglo kiel sociala helpisto en la Germanio de la 60-aj jaroj.

Aŭtobiografio de nederlanda SS soldato en Anglio. Philip Buttinger. 234 p. Verko legebla kiel spionromano, sed spicita de malkaŝaj romantikaj epizodoj.

La Aĵoj kaj la Sezonoj. Ulrich Becker (1958). Originala novelaro kun ses linoleumgravuraĵoj de Uday K. Dhar. Vieno: Pro Esperanto, 1996. 114 p. Prozaĵoj el 1990-1995, de plurfoja premiito de Belartaj Konkursoj.

La bona lingvo. Claude Piron. Vieno: IEM, 1989. 111 p.

”Pri la bona lingvo mi babilos kun vi, se vi konsentas. ”Bona kiurilate?” vi demandas sendube, konscia pri la multaj sencoj de tiu ĉi vorto. ”Ĉiel, mi respondas. Ĝuste tion mi ŝatas pri tiu lingvo, ke laŭ tiom da aspektoj ĝi bonas al mi.”

Elokventa, konversacistila pledo por la riĉeco de la ”reala”, parolata Esperanto, surbaze de psikologiaj, stilaj kaj sociaj konsideroj.

Bukedo al vi. Mikronoveloj. Pekino 1984. 95 p.

Falantaj muroj kaj aliaj rakontoj. Trevor Steele (1940). Vieno: IEM, 1997. 160 p. Travivaĵoj de la aŭtoro en Sovetio, Pollando kaj GDR en 1990-1991, plus kelkaj en aliaj landoj kaj tempoj.

Anne Frank ne estas de hieraŭ. Mies Bouhuys. Apeldoorn 1998, trad. Nora Bar-

tels. 194 p. Antaŭ 50 jaroj datiĝis la lasta letero de talenta knabino, pereonta pro rasismo.

Hanako lernas Esperanton. Doi Ĉieko. Jokohamo: Mevo, 1993. 139 p. Internacia lernolibro por komencantoj.

Hetajro dancas. Eli Urbanová. Chapecó-Sc, Brazilo: Fonto, 1995. 327 p. ”Senkliŝa, senpruda kaj sentabua” aŭtobiografia romano de la ĉeĥa poetino, kiu ”pulsas per tono de rekta parolado” (Rossetti).

Historio de la Mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado. E. Drezen. Moskvo 1991. 453 p. (esperantaĵo).

Kaj tiam floris la ĉerizarboj... I Kune kun miaj kunvojagxantoj, II Viv-observoj. Aira Kankunen. Göteborg 1997. 127 p.

La unua parto enhavas noveletojn ĝojajn, sed ankaŭ tristajn; en ili speguliĝas la sortoŝanĝoj de niaj proksimuloj. La mallongaj ĉapitroj de la dua parto, Viv-observoj, estas kolektitaj meze de subitaj preterirantaj momentoj, kiuj per siaj koncizaj mesaĝoj igas la leganton pensi pri nia momenta, sed – aj! – ofte malsukcesa vagado sur ĉi tiu planedo.

Karnavale (maskita rakonto). Abel Montagut (1953). Vieno: IEM, 1997. 65 p. Forme varia, poezia priskribo de ”senzorga maskerado” en Katalunio, kiu alegorias memvolan forlason de la propra lingvo.

Korespondi deziras

Inĝeniero, interesito de Finnlando kaj filatelo. Serĉas finnlandan korespondamikinon, kiu hobias filatelon. Jerzy Michalski, Poczta 9, PL-26-660 Jedlinsk, Polska.

Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Lukijakunnan pyynnöstä alamme julkaista tästä lähtien jokaisessa lehdessä tätä osoitteistoa, jotta esperantoliikkeeseen perehtymätönkin löytää heti lähimmän esperantoryhmän osoitteen. Muutokset ja lisäykset tähän osoitteistoon voi lähettää Aimo Rantaselle, PL 2, 40801 Vaajakoski, s-posti aorantan@jylk.jyu.fi mieluummin kirjallisina.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ **Helsingissä:** Helsingin Esperantoseura / Esperantoklubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
Sähköpostiyhteys: Sakari Kauppinen, <sakari@skau.pp.fi>.
- ♦ **Iisalmessa:** Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi.
- ♦ **Jyväskylässä:** Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, PL 136, 40101 Jyväskylä.
Sähköpostiyhteys: Matti Lahtinen, <matlah@sci.fi>.
- ♦ **Lahdessa:** Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kallio-
maankatu 10, 15150 Lahti.
Sähköpostiyhteys: Martti Pennanen, <fin.lahti@marttip.pp.fi>.
- ♦ **Mikkelissä:** Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkeli, (Elli Husso) Pietarinkatu 22 B 20, 50100 Mikkeli.
- ♦ **Oulussa:** Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valta-
tie 6-8 B 15, 90500 Oulu.

- ♦ **Salossa:** Salon Esperantokerho / Esperantoklubo de Salo (Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla.

- ♦ **Tampereella:** Tampereen Esperantoseura Antaüen / Esperantosocieto Antaüen, (Jukka Laaksonen) Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere.

Sähköpostiyhteys: Veli Hämäläinen, <veli.hamalainen@pp.kolumbus.fi>.

- ♦ **Turussa:** Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku.

Sähköpostiyhteys: Tiina Oittinen, <tiina.oittinen@orion.fi>.

- ♦ **Lappeenrannassa** esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan “esperantoryhmä”, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen **opettajien** esperantoliitto, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi.

Sähköpostiyhteys: Raita Pyhälä, <raita.pyhala@lestijarvi.fi>, puhelin (06) 8637 351.

- ♦ Suomen **nuorten** Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

- ♦ **Sokeiden** esperanto-yhdistys Steleto. Pietarinkatu 10 D27, 00140 Helsinki.

Sähköpostiyhteys: Ritva Sabelli, <Ritva.Sabelli@sfs.fi>, telefaksi (09) 660 651.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta haku-
sanan Esperanto kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Muut lehdet

Jyväskylän E-opintoviikon aikana Keski-suomalaisen toimittaja Satu Konttinen haastatteli tiistaina 30.6 opintoviikon toista opettajaa, Joel Brozovskya, joka kertoi ensin luulleensa, että maailma on täynnä vain vieraita ulkomaalaisia, mutta esperanton kautta kaikista Joelin ulkomailla tapaamista ihmisistä onkin tullut hänen läheisiä ystäviään. Samassa haastattelussa kesäkurssin monivuotinen yhdyshenkilö Seija Kettunen totesi: "Suomessa esperantoa puhuu ja ymmärtää hyvin ainakin reilut tuhat ihmistä, mutta kurseja käyneitä on useita tuhansia".

Kesäaikana harvoin tapahtuu sellaista, josta voisi repäistä jymyotsikot lööppeihin. Tämä kesän kuumiin kotimaan uutisiin koski karhun tappamaa miestä. Tapahtuma oli traaginen ja tuosta tapahtumasta lähtien vaadittiin jokaisen vapaana liikkuvan karhun päätä vadille. Muutama vuosi sitten oli vielä

tapahtumattomampi uutiskesä, koska Ruokolahden leijona sai koko Suomen liikkeelle. Tunnen trendejä pakonomaisesti seuraavia, jotka matkustivat tuona kesänä Ruokolahdelle leijonankuvajahtiin.

Kesäaika on tilaisuus tuoda esille myös esperantoa. Pahimmat esperanton vastustajat ovat lomalla, eikä pilkkakirveitäkään heitellä niin hartaasti kohti kansainvälisen kielen puolustajaa kuin muulloin. Kirjailija Leena Landerin kolumnista 3.6 alkoi Turun Sanomissa pro–contra -keskustelu sekä latinan että esperanton mahdollisuuksista Euroopan Unionin yhteisenä kielenä. Mielenkiintoinen tuossa keskustelussa oli vertaus yhteisen rahayksikön euron rinnastamisesta yhteiseen eurooppalaiseen kieleen. Mielestäni standardiluokitus kuitenkin harvoin soveltuu kieleen. Mieleen sellaisesta tulee vain Orwell.

Seuraava numero ♦ Venonta Numero

Ilmestyy lokakuun alussa 1998. Jutut 15.9 mennessä Aimo Rantaselle, PL 2, 40801 Vaajakoski, puh. (014) 261 438. Venonta numero aperos en la komenco de oktobro 1998. Sendu la artikolojn ĝis la 15-an de septembro al Aimo Rantanen, PL 2, FIN-40801 Vaajakoski, tel. (014) 261 438.